

HEROLDO

Eidono: Flandra Esperanto-Instituto, P. v. Humbeekstr. 3, Brussel-West.
Redakcio-Administracio: T. Jung, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Ned.
Abonkoto por la kuranta periodo (januaro-septembro 1947 = 9 monatoj):
Belgujo 100 fl., Nederlando 5.50 gld., cetero 2.50 dol. aŭ 10 angl. ŝil.
Anoncoj: 20 komencitaj vortoj aŭ mallongigoj b. fl. 20.—, gld. 1.— ktp.

DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA ORGANO DE LA ESPERANTO-MOVADO

N-ro 3 (1062)

FONDITA EN 1920 — 23-a JARKOLEKTO

1 Februaro 1947

TAGIĜAS

Multaj legantoj esprimis al la redaktoro sian miron pri tio ke ni sukcesis, en la nunaj cirkonstancoj, denove regule aperigi Heroldon. Efektive, la postmilitaj cirkonstancoj estas ankoraŭ tre malfacilaj, kaj multriplate eĉ kaosaj. Se malgraŭ tio ni sukcesis, restarigi Heroldon kaj eldoni ĝin provizore almenaŭ kiel duonmonatan organon, ne ĉiam tute akurate je la fiksitaj datumoj (pro troa okupo de la presejo) sed tamen sufiĉe regule, tio estas dankinda al la helpo, kiun la redaktoro ricevis ĉefe de du flankoj: nome de IEL kaj ĝiaj ĉefdelegitoj, kaj de la direktoro de Flandra Esperanto-Instituto, s-ro E. Cortvriendt. Sen ilia helpo, la eldonado de Heroldo en la postmilitaj cirkonstancoj tute ne estus ebla. Tial IEL kaj ĝiaj ĉefdelegitoj, kaj FEL, kaj tute speciale s-ro Cortvriendt, meritas la sinceran dankon ne nur de la subskribinto, sed de ĉiuj gesamideanoj kiuj opinias la aperadon de gazeto kiel Heroldo grava por nia movado.

Tiun dankon unufoje elparoli ĉefloke, mi opiniis mia nepra devo.

T.J.

VERDSTELAJ RADIOJ.

— Int. Esperanto-Ligo atingis ĝis fino de novembro 13.463 membrojn, el kiuj 5803 individuaj. Fine de novembro 1945 la respektivaj nombroj estis 7503 kaj 3539. « Esperanto Internacia », la organo de IEL, aperas en la nova jaro en pli granda formato (18,5 x 25 cm).

— La subskriboj por la *Petskrubo al UNO* superis en la fino de 1946 la duan centmilon. Gvidas Nederlando kun pli ol 40.000 subskriboj. Sekvas Bulgario kun pli ol 20.000, poste Britujo, Svedujo, Francujo, Ĉeĥoslovakio kaj Norvegujo kun po 10-20.000. La ceteraj landoj restis sub 10.000. Relative plej bone laboris Islando.

— Laŭkalkule ĉiu anglalingva parolado, farita ĉe la *Generala Kunveno de UNO*, necesigas 288 laborhorojn en la Ĝenerala Sekretariejo, por la tradukado en la diversajn aliajn lingvojn. Imagu la ŝparon, se Esperanto estus la sola oficiala, aŭ eĉ nur la sola traduka lingvo!

— La nomo de ĉefstrato apud la stacidomo de *Hradec Kralové* en Ĉeĥoslovakio estas oficiale ŝanĝita je *Ulice dra Ludvika Lazara Zamenhofa* (Strato de D-ro L.L. Zamenhof). Pli alta distrikta komitato donis sian aprobon.

— La Konsilantaro de UEF (Francujo) esprimis la opinion ke, post *kunfandiĝo IEL-UEA*, la nomo Universala Esperanto-Unio estus la plej taŭga, sed ke ankaŭ unu el la ĝisnunaĵoj nomoj taugus (IEL aŭ UEA).

— Hungara Esp. Societo Laborista kaj Hungara Esp. Societo (ĝenerala) en komuna diskutvespero decidis inviti *Universalan Kongreson kaj samtempe SAT-Kongreson* por 1949 aŭ 1950 al *Budapest*.

— En Francujo, la prezidanto de UEF, P. Petit, sukcese partoprenis oratoran kurson perradian, parolante pri Esperanto. En la Pariza Sorbono malfermiĝis nova supera Esperanto kurso. En Laval post kurso de s-ino Haubebine fondiĝis grupo. Novaj grupoj starigis ankaŭ en Orange kaj Rumilly. Kursoj funkcias en Guéret, Roanne, Romans, Rumilly, Toulon, Villefranche kaj aliaj urboj.

— Ĉe la *Universitato de Lodz* (Polujo) estas starigita *lektorado por Esperanto*: lektoras inĝ. L. Temerson. En samurba gimnazio Z. Petkowski okazas du kursoj kun 40 lernantoj.

— Ĉe la eldonejo Born N.V. en Assen (Nederlando) aperis du libroj sub la titolo « Van vreemde velden » (El fremdaj kampoj), kiuj enhavas *rakontojn, pere de Esperanto kolektitajn* kaj tradukitajn el diversaj lingvoj.

(Vidu pĝ. 2 kol. 1)

Unufoje en la mondo, la nova franca konstitucio proklamas: «Sub kondiĉo de reciprokeco, Francujo konsentas limigi sian suverenecon favore al la organizado kaj defendo de la paco.»

Do, oficiale nia lando konsentas pri la limigo de la nacia suverenecon. Tio reprezentas, laŭ mi, la unuan paŝon de la tagiĝo, kiun revis nia majstro.

Efektive, en ĉiuj partoj de la mondo leviĝas homoj, kiuj konsideras nepre necesa — se oni ne deziras ke la mondo mortu sub la tremo de la atomaj bomboj — ŝanĝi la formon de tiu ĉi mondo. Por tiuj homoj estas klare ke, same kiel oni ne plu povas konsideri kiel suverenan la diversajn provincojn de la landoj, post kelkaj jaroj oni ne plu povos konsideri la mondon laŭ nacioj apartigitaj, sed nur laŭ provincoj de federala superŝtata unuigo.

La Unuigitaj Ŝtatoj de la Mondo, kiuj estas eble ankoraŭ la hodiaŭa utopio, certe fariĝos la efektiviĝo de la baldaŭaj jaroj. Ni, kiuj travivis du terurajn militojn, okazintajn pro la ekonomia nacia demando, vidos kaj vivos pli mildan mondon, kie estos superŝtata Parlamento de la Popoloj kaj de la Ŝtatoj, superŝtata estraro, universala mono kaj *helpa universala deviga lingvo*.

Eble, kelkaj parolos ankoraŭ pri diversaj lingvaj projektoj. Sed, fakte, ĉar Esperanto ne plu estas projekto, sed vivanta lingvo de vivanta popolo, certe Esperanto fariĝos la helpa lingvo de la Unuigitaj Ŝtatoj de l' Mondo.

Verŝajne, en 1960, ni povos partopreni la kunsidojn de la superŝtata Parlamento, ie en Eŭropo aŭ Ameriko, kie la deputitoj, elektitaj en Svedujo aŭ en Francujo, diskutos pri la necesaj impostoj trudotaj al la belgoj kiel al la brazilanoj, al la svisoj kiel al la britoj. Tiu diskuto okazos nur en Esperanto, ĉar la lingvo de la Universala Parlamento povos nur esti la universala lingvo.

Zamenhofaj tagoj

Antaŭ kelkaj semajnoj la tutmonda esperantistaro, kiel kutime, festis la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Kiel kutime, oni laŭdis la kreinton de Esperanto, kaj dum komunaj solenaĵoj oni ricevis instigon por plua laborado kaj penado por liaj idealoj. Kaj nun antaŭ miaj okuloj preterŝoviĝas bildoj el la pasinteco.

Jaro 1938. La politika horizonto ĉiam pli densiĝis. Hitlerismo kaj faŝismo fariĝis ĉiam pli ekspansiemaj, pli atakemaj. La milito alproksimiĝis per sepmejraj botoj. Tamen ni Varsoviaj esperantistoj decidis aranĝi kutiman Zamenhofan solenaĵon. La bele ornamitan salonon de Varsovia Esperantista Societo plenigis kelkcent gesamideanoj. Ĉe la tablo de l' prezidantaro sidis la plej eminentaj Varsoviaj gesamideanoj, reprezentantoj de la familio Zamenhof. Paroladoj, deklamado, kantado. En la apuda ĉambro vendado de Esperantaj libroj.

Jaro 1939. La milito jam daŭris. Dum kelkaj semajnoj Polujo estis

La franca landa asocio, kiun mi havas la grandan honoron prezidi, decidis montri al la ŝtatestroj, al la parlamentanoj, la eblecojn de Esperanto por la interpopolaj diskutoj. Por pentekosto 1948, *Franca Esperanto-Unuigo kunvokas al Paris, sidejo de UNESCO, tutmondan konferencon, kies nura lingvo parolata estos Esperanto.*

Tiu konferenco, laŭ la modelo de la internacia konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », havos kvar komisionojn:

1. Politika komisiono, kies membroj estos nur ŝtatestroj, parlamentanoj kaj oficialaj reprezentantoj de politikaj partioj diverslandaj;
2. Ekonomia komisiono, kies membroj estos reprezentantoj de sindikatoj, komercaj ĉambroj, industriistoj, komercistoj ktp.;
3. Eduka komisiono, kies membroj estos edukistoj, kleruloj pri radio, kino, teatro, beletristiko ktp.
4. Scienca komisiono, kies membroj estos sciencistoj ĉiuspecaj.

Ni nun alvokas ĉiujn landajn asociojn, ĉiujn esperantistojn, ke ili klopodu, por ke ŝtatestroj, parlamentanoj ktp., nepre necesaj por la sukceso de la konferenco, ekpraktiku Esperanton. De la sukceso de tiu konferenco dependas la finsukceso de nia lingvo.

Ĉiuj, kiuj deziras helpi la preparon de la konferenco, tuj skribu al: U.E.F., 34 rue de Chabrol, Paris.

1898 — starigo de la unua landa asocio, SFPE.

1948 — kiel jubileon ni alportas al la esperantista mondo la esperon de finsukceso.

Ĉu utopio? Ne, ni pravas...

Al nia majstro ni dediĉos nian sukceson.

Jes, absolute jes... tagiĝas.

PIERRE PETIT
Prezidanto de UEF
Komitatano de IEL.

Altrangaj amikoj de Esperanto en Aŭstrio.

La 7-an de decembro 1946 okazis en Vieno la fonda ĝeneralkunveno de la « Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto ». La societo celas kolekti senkonsidere de deveno, religio, sekso kaj profesio ĉiujn, aŭ esperantistojn aŭ neesperantistojn, kiuj sincere volas kunlabori por la interkompreniĝo de la popoloj kaj starigo de vera paco en la mondo, kaj kiuj konsideras sia speciala tasko la ideon de universala lingvo, kiu estas nuntempe praktike efektiviĝanta en la formo de Esperanto.

Kiel honorprezidanto estas elektita Federacia Kanceliero inĝ. Leopold Figl, kiel honoraj vicprezidantoj la federaciaj ministroj D-ro Hurdes, D-ro Heigl kaj D-ro Frenzel; en la honorkomitato estas elektitaj personoj de la politika, kultura kaj ekonomia vivo de la respubliko Aŭstrio. La estraron gvidas la societa prezidanto, sekcia konsilanto D-ro Maximilian Führung kaj liaj anstataŭantoj Ferdinand Noggler kaj Raimund Cech. La sidejo de la societo estas en Vieno I, Neutorgasse 9.

Fondo de samtaskaj naciaj societoj de amikoj al Esperanto en aliaj landoj estas tre rekomendinda. La estraro volonte donos informojn.

En la venonta numero ni publikigos detalojn pri la movado en Aŭstrio, el kiuj oni vidos, ke malgraŭ la sepjara nazi-regimo, aŭ eble ĝuste pro tiu regimo kaj ties agado kontraŭ nia afero, Esperanto denove grandmezure reviviĝis en la aŭstria respubliko.

Skolto, kiu ne parolas Esperanton, estas kiel sonorilo sen frapilo

Antaŭ 15 jaroj la fervora propagandisto kaj skoltestro Ernesto Farkas fondis skoltan esperantistan klubon en Szeged, kie li organizis plurajn kursojn por geskoltoj. Lia signaldiro estis: Skolto, kiu ne parolas Esperanton, estas kiel sonorilo sen frapilo, aŭ kiel rivero sen akvo.

La klubo aranĝas preskaŭ ĉiujare kursojn por geskoltoj. Dum la pasintaj 15 jaroj lernis la internacian lingvon proksimume 300 geskoltoj en Szeged, kaj oni aranĝis tri imponajn ekspoziciojn. La klubanoj vizitis la lokan blindulejon, kie ili amuzis la esperantistajn blindulojn, kaj organizis dumvintre popoledukan kurson por la urbanoj, en kiu oni parolis pri diversaj temoj klarigitaj per lumbildoj. Do la klubanoj klopodas realigi en la praktiko la « bonan laboron ». Nun roverskolto Stefano Csombai gvidas kurson por skoltoj. Adreso de la klubo: Esperantista Rondo de Szegedaj Skoltoj (Cserkész Eszperanto Kör), Karasz u. 9, Szeged, Hungarujo. Prof. A. GAUDER.

Ethel ne hezitis diri ĝin al britaj radio-aŭskultantoj.

Kion ŝi ne hezitis diri? Jen legu (laŭ « The British Esperantist »):

En la vespera programo de la Brita Brodkasta Kompanio de la 13-a de novembro 1946, sub titolo « Have a Go », s-ro Wilfred Pickles intervjuis nombron da geokupitoj en Leeds'a fabriko. Unu el la intervjuitoj estis fraŭlino Ethel M. Neale. Responde al demando, ŝi diris ke antaŭ la milito ŝi vojaĝis en Nederlando, Belgujo kaj Svislando. Sekvis proksimume la jena (angla-lingva) konversacio:

S-ro Pickles demandis: — Ĉu vi parolas la nederlandan lingvon?

— Ne.

— Kiel do vi interkompreniĝis en Nederlando?

— Mi vojaĝis kun esperantista amikino, kaj en Holando ni ambaŭ dum la tuta semajno parolis Esperanton kun la nederlandaj esperantistoj.

S-ro Pickles demandis pri ŝia laboro en la fabriko, kaj poste li diris: — Ĉu vi povas tion diri en Esperanto?

La respondo estis (nun en Esperanto): — *Jes, sinjoro; mi laboras en la pantolona fabriko.*

La anglaj aŭskultantoj do ricevis bonan propagandan lecionon, mallongan sed efektivan, de simpla laboristino.

Ankaŭ rekordo.

Dum la milito, en la diversaj armeoj batalis homoj el multaj nacioj, aŭ kun multaj diversaj gepatraj lingvoj. Estas malmulte konate, ke la nederlanda Brigado Princino Ireo estis unu el la plej poliglotaĵaj formacioj el ĉiuj. Ĝi nome havis en siaj vicoj nederlandanojn el la tuta mondo, kiuj parolis 26 diversajn lingvojn. Tio estis, laŭ asertoj en nederlandaj ĵurnaloj, pli multaj lingvoj ol estis reprezentitaj ĉe la RAF (brita aer-armeo).

(Fino sur pĝ. 2.)

La eminentaj kvalitoj de Esperanto kiel ponto inter Okcidenta kaj Orienta Eŭropo.

Grava kunkludo de Prof. W. E. Collinson.

Profesoro W.E. Collinson, M.A., Ph.D., Profesoro de la Germana Lingvo kaj de la Esperanta Katedro ĉe la Universitato de Liverpool, donis treege interesan paroladon antaŭ la Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj, dum semajnfina konferenco, la 4-an de januaro 1947, en City Library Institute, Londono.

En profunda sed humora maniero li montris la esencan naturecon kaj vivtaŭgecon de Esperanto, donante klaran supervidon de diversaj aspektoj de ĝia vortfarado kaj kunmeto, kompare kun la latinidaj kaj aliaj eŭropaj lingvoj. Finante, li diris:

«El la esploradoj, kiujn mi prezentis, ni plene rajtas konkludi, ke Esperanto havas plejparte radikaron el la latinidaj lingvoj de la okcidento, sed la interna organismo kaj strukturo pli parenkas al tiuj de la mez-kaj orient-eŭropaj lingvoj. Tio estas bone komprenebla, se oni memoras, ke Zamenhof posedis kiel tri ĉefajn lingvojn la rusan, polan kaj germa-

nan. Ĝuste pro tiuj ecoj Esperanto multe pli taŭgas ol Ido, Occidental aŭ iu alia artefarita lingvo, por servi kiel ponto inter la tielnomitaj okcidenta kaj orienta blokoj de Eŭropo.

La genio de Esperanto kuŝas precize en tio, ke ĝi naskiĝis en la cerbo de unu individuo, kiu multe ŝatis lingvojn kaj sciopovis — almenaŭ lege — sufiĉe multajn, inkluzive la klasikajn grekan kaj latinan. Ĝi ne estas la seka kompromiso de komitato. Metafore ĝi similas al prismo, el kies facetoj rebrilas ĉiuj koloroj de la eŭropa lingva ĉielarko etendiĝanta de la atlantikaj bordoj ĝis la stepoj de la Sovetunio. Ankaŭ la praktiko montris nerefuteble, ke la strukturo de Esperanto bone konformiĝas al la postuloj de la pensmaniero de la malproksimaj orientaj landoj de Azio.»

E.D. DURRANT,

Hon. Informa Sekretario de BEA.

(Gesamideanoj, traduku tiun ĉi artikolon kaj publikigu ĝin en nacilingvaj gazetoj !)



HENK VALCKENIER

nederlanda samideano, gvidanto de muziklernejo kaj de sinjorina Esperanto-ĥoro, estas invitita por partopreni en koncerto okaze de la Universala Kongreso en Bern, kune kun ĉeĥa samideano, *Johano Geryk*, violon-virtuozo, kaj eble kun eminenta sopranistino de la Praha Teatro.

«Espero», la arkeo de artistoj, ĉu fantazio aŭ realaĵo?

Cirko sur ŝipo, naĝanta de unu haveno al alia, kaj de unu lando al alia, vera arkeo de artistoj, — ankoraŭ ĝi ekzistas nur en la fantazio de nia samideano Pedro Thorandos, denaska latvo, artisto, ekonomia pentristo kaj posedanto de cirko, kiu provizore estas atingebla sub la adreso: Pedro Thorandos (Olger Dreimann), Pension Waldrieden, Schwarzenweg 16, Füssen (Allgäu), Bavario, USA Zono, Germanujo. Sed eventuale ĝi fariĝos realaĵo. Jen kion s-ro Thorandos-Dreimann mem skribas pri sia ideo:

Kiel la mondhelpingvo Esperanto servas al la interligado de popoloj, tiel la de mi projektata kaj preparata mondvojaĝo de artistoj per specialŝipo servu por la sama celo. Internacia grupo de artistoj kaj filmistoj vojaĝos sub la Esperanto-signo, la verda esperstelo, de havenurbo al havenurbo laŭlonge de la Atlantiko, tra la Mediteraneo, kaj fine ankaŭ al la Nova Mondo. Dum la ŝipo estos en la haveno alirebla kiel flosanta ekspozicio, prezentadoj de ĝia artistaro okazos en la urbo mem. Teatraĵoj, koncertoj, artistiko kaj ekspozicioj de dumvoje farigintaj artverkaj direktos la atenton de la publiko al tiu ĉi unika popolinterliga entrepreno. La ŝipo havos la nomon «Espero», kaj ĉie, kie ĝi ankros, ĝi varbos, kunlabore kun la esperantistoj, ankaŭ por la mondhelpingvo.

Interesuloj pri la ideo, precipe geartistoj diverslandaj, skribu al la supre citita adreso.

Hungara Biblioteka Centro ekuzas Esperanton.

La Landa Biblioteka Centro (Hungarian Libraries Board, Országos Könyvtári Központ), Budapest IV, Ferenciek tere 5, oficiale akceptis Esperanton, aligis al IEL kiel entrepreno por 1947 kaj proponas siajn servojn al la Esperanto-societoj kaj eldonejoj. Oni povas sendi al la Centro por la hungaraj abonantoj kaj membroj en komuna pakajo aparte enkovertigitajn kaj adresitajn revuojn, librojn, broŝurojn, kiujn la Centro dissendos al la hungaraj adresoj. Oni povas sendi al ĝi ankaŭ kvanton da turismaj, foiraj kaj similaj prospektoj, kiujn la Centro aldonos al pakajoj sendotaj al hungaraj institutoj, lernejoj ktp. La Centro okupiĝas ankaŭ pri akiro de kia ajn havebla hungareldona libro en kiu ajn lingvo je normalprezo, kontraŭ ensendo de la elspesoj. La Biblioteka Centro havas Esperanto-sciantan oficiston. La servojn de la Centro povas uzi kiu ajn eksterlanda institucio, kiu havas por sendi librojn, revuojn ktp. al hungaraj; do oni atentigu pri tio en nacilingvaj revuoj.

«Maljuna Moore» profetas.

«Maljuna Moore» estas angla almanako, pli ol centjara; ĝi aperas ĉiujare kaj enhavas profetaĵojn por ĉiu monato de la jaro venonta. Por junio 1947 ĝi profetas la jenon:

«La influo de la lingvo sur internaciaj aferoj estas denove diskutata. La angle-parolantaj popoloj manipulas povon tute neproporcion al sia nombra forto. *Basic English* estas subtenata kiel rimedo por simpligi internaciajn diskutojn.»

Tio signifas ke tiu subtenado al *Basic English* okazos en junio nunjara! Tre ofte «Maljuna Moore» estas prava — sed ĉu ĝi ne estos malpravigata en junio? *Basic English*, laŭ la opinio de spertuloj, neniel posedas la kvalitojn por funkcii kiel internacia lingvo. Aŭ ĝi servos nur por balbuti, aŭ ĝi fariĝos ... la originala angla lingvo.

REDAKCIA LETERKESTO.

El Varsovio atingis nin neordinara kartsaluto: Okaze de la baptifesto de 8-semajna filo de IEL-fakdelegito ing. T. Pleskaszynski naŭ Varsoviaj gesamideanoj trinkis ankaŭ je la sano de Heroldo. Ni kore dankas kaj permesis al ni, niaflanke trinki je la sano de l' juna baptito kaj je tiu de l' renaskiĝinta Esperanto movado en la urbo kaj lando de la majstro.

Subtenantoj. Kiel Subtenantaj Abonantoj de Heroldo aligis s-ro Mehmed Jakupović en Zemun, Jugoslavio, kaj s-ro T.L.C. Bluett en Truro, Britujo. Sinceran dankon!

J.C. en N.-s.-V. Meneteklo signifas flamskriban averton, laŭ la flamvorto «Mene — tekel — ufarsim» kiuj aperis al la babilona reĝo Baltasaro (Belzacaro).

Kiam altrangaj «onkloj» kunvenas.

S-ano J. P. atentigis min pri artikolo «Hooge Oomes kwamen bijeen» (Altaĵ onkloj kunvenis), en «Haagsche Post» de 11.1.1947:

En 1943 okazis en Kairo konferenco, kiun ĉeestis Prezidanto Roosevelt, Churchill, Cankajček kaj ties edzino. Je festeno ĉe la turka delegitaro Churchill estis honorigita. Ankaŭ ĉeestis Anthony Eden. La sola lingvo, per kiu oni povis sin igi komprenebla, estis la franca. Churchill rakontis al la turka prezidanto la historion de sia vojaĝo al Teheran, dum Eden, kiu sidis apude, pliklarigis la rakonton en komprenebla franca lingvo. Subite Churchill malkontentigis pri tio kaj diris: «Anthony, mi deziras ke vi ĉesu traduki mian francan lingvon en la francan lingvon!»

Poste aperis ankaŭ sovet-oficiroj, kiujn oni konsideris kiel generalojn. Ili nur parolis kaj sciis ruse...

La angla lingvo sufiĉas, oni diras, por igi sin komprenebla ĉie!

URTIKO.

Zamenhofaj Tagoj.

(Fino de la 1-a paĝo.)

Ankaŭ la subskribinto prenis la parolon. Por momento ni forgesis pri la terura estanteco; ja brilis al ni «la celo, al kiu kuraĝe ni iris»...

Pasis jaroj plenaj de turmentoj, suferoj, persekutoj. Jaroj plenaj de sango, teroro, furiozo, teruro. El la gesamideanoj amase partoprenintaj la Solenan Zamenhofan Feston kaj modestajn, memorindajn vesperojn en juda geto en Varsovio neniu restis vivanta.

Jaro 1946. Sur la lacigita tero ekregis paco. Ree kunvenis tra la mondo gesamideanoj por la Zamenhofa festo. Ni en Varsovio pro la teknikaj kaŭzoj ne povis ion aranĝi. Sed la ondoj de «Pola Radio» disaŭdigis ĉien la vortojn de nia himno, de bela Zamenhofa «Vojo» kaj pri li mem.

Kaj honorinte la majstron ni, havantaj la bonŝancon transvivi la teruraĵojn de Hitlerismo kaj milito, kun novaj fortoj kaj esperoj iru «la vojon celitan».

I. DRATWER, Varsovio.

Atingis nin en la daŭro de januaro raportoj pri Zamenhof solenoj en diversaj lokoj kaj landoj; sed la lokmanko devigas nin rezigni ilian publikigon. Interese estas ke en Montevideo, la ĉefurbo de Urugvajo, la Zamenhof-festo sukcesis precipe dank'al la helpo de la radio-katedro «La Voz de Polonia» (La Voĉo de Polujo), tiel ke ankaŭ la samideanoj en la provinco povis aŭskulti la altnivelan programon. Multaj urugvajaj ĵurnaloj publikigis favorajn raportojn pri tio, kelkaj kun ilustraĵo de la organizintoj. — Red.

Esperanto estas enkondukita kiel nedeviga fako ĉe la mezlernejo Beith Hakerem en Jerusalemo; okazas kurso kun 25 lernantoj.

Samideanoj en Angers (adreso: F-ino Nouais, 28 bd. Descaveaux, Angers, Francujo) projektas la arangan de Internacia Esperantista Universitato, en du partoj po du semajnoj, dum aŭgusto nunjara.

En diversaj lokoj de Hungarujo komenciĝis 20 Esperanto-kursoj por entute 362 fervojistoj. Multloke lernas ankaŭ skoltroj, kiuj intencas viziti la jamboreon apud Parizo.

En la doganejo de la nederlanda flughaveno Schiphol estas fiksataj ŝildetoj kun surskribo: «Oni parolas Esperanton».

Franca Sportkongreso akceptis deziresprimon favore al Esperanto. Subskribis la jenaj organizoj: Fédération F.S.G.T., Organisation Centrale des camps et auberges de la jeunesse; Section Plein Air CSPSE; Francs et Franches Camarades; Union Laïque des campeurs randonneurs; Fédération Française de Canoë; Fédération Française de ski; Mouvement laïque des auberges de la jeunesse; U.N.C.M.

El Varsovio: Varsovia Filio de Esperanto Asocio en Pollando kun helpo de IEL presigis 35.000 deklaraĵojn por la Petskribo, kiuj nun estas dissendataj. Pli ol 500 personoj petis informojn pri korespondanta kurso. La gazetaro de tempo al tempo presigas sciigojn pri Esperanto. En ĉokoladfabriko Wedel okazis malgranda Esperanto-ekspozicio.

Starigis Dana Esperantista Komuna Komitato por reprezenti la tutan danan esperantistaron (ĝeneralan kaj laboristan).

Sveda Laborista Kleriga Asocio (pli ol miliono da membroj!) decidis okazigi kurson por kursgvidantoj de Esperanto, en popola altlernejo Brunnsvik, dum venonta aŭgusto.

Ni bedaŭras la morton de francaj samideanoj Léon Bigot en Montereau, Marius Vanel en Parizo kaj s-ino Capdebosq en Asnières; svisa samideano K. L. Haas en Luzern; anglaj samideanoj C. Oxenford (fondinto de Esp. Vagabonda Klubo 1908-1914, Ellen Parker el Herman Hill, kaj F. M. Wood en Wakefield. Jam la 10.5.1945 forpasis 81-jara bulgara samideano Hristo Popov en Dolna Orehovica, unu el la unuaj esperantistoj en la tuta mondo.

Kiam homoj ŝanĝiĝas, nacioj ŝanĝiĝas.

Alte en la svisaj montoj estas vilaĝeto — Caux. Dum la vintro multaj vizitantoj ĝuas la glitveturadon, kaj dum la somero ili ĝuas la belecon de la pejzaĝo super la Lago de Genevo. Malproksime malsupre vidiĝas Montreux.

Dum la somero de 1946 pli ol 3000 vizitantoj el multaj nacioj pasis tra Caux kaj restis en la «Monto-Domo». Tio estas hotelo kiu, dum la milito, ŝirmis rifuĝintojn. Kiam ĝi malpleniĝis, grupo de svisoj kune aĉetis ĝin kaj prezentis ĝin al D-ro Frank Buchman, la fondinto de la «Oxford-grupo», kaj nun ĝi estas ties Eŭropa Centro. Tiuj multaj vizitantoj lernis pri la plano de la Oxford-grupo — morala rearmado — dum sia restado kaj reiris al siaj hejmlandoj impresite pri ĝi.

Laŭ la vortoj de D-ro Sih, la ĉina plenpopulo ĉe la Pariza Pac-Konferenco, «la kunveno ĉi tie (en Caux) estas pli grava ol la Pariza. La Pac-Konferenco estas reprezentita de nur 21 nacioj. Ĉi tie ni havas pli multe da naciecoj kaj ĉi tie ni havas pli multe de la spirito de kunlaboro — do mi preferas esti ĉi tie ol en Parizo.»

Inter aliaj konatuloj, kiuj vizitis la Monto-Domon ĉe Caux, estis s-ro V.G. Dalvi (sekretario de la Hinda Unuiĝo de Poŝtistoj), s-ro Abid Ali (prezidanto de la Hinda Federacio de Transporto), dek anglaj parlamentanoj de diversaj partioj, f-ino Marion Anderson (usona filmaktorino) kaj multaj ĵurnalistoj, ekleziestroj kaj unuigestroj.

Kio do estas MRA (morala rearmado)? La milionoj da sekvantoj de ĉi tiu ideologio kredas ke Dio havas planon por la mondo — planon, kiu sukcesos, kie la homoj malsukcesis. Ili nomas ĉi tiun planon MRA.

Dum la pasintaj jaroj ni travivis teruran militon, kaj eĉ nun, pli ol 19 monatojn poste, la nacioj ne povas interkonsenti, kaj la timo por la atombombo kaj la ombro de tria mondmilito kuŝas super ni kiel malluma nuboj sur ŝtorma ĉielo. En la klopodoj por trovi solvon ni forgesas Dion, kaj tial malsukcesas. Nur tutkora turniĝo al Dio kaj Lia plano alportos al ni la universalan pacon, de ĉiuj deziratan. Do, jen la celo de MRA!

La Oxford-grupanoj klopodas vivi laŭ la kvar absolutaj «standardoj»: honesteco, ĉasteco, malegoismo kaj amo. Ili ellitiĝas duonhoron antaŭtempe ĉiumatene kaj aŭskultas Dion por ricevi Liajn planojn por sia tago. Ila celo estas igi ĉiujn — vin kaj min — uzi la kvar absolutojn kaj aŭskulti Dion. Ili asertas ke la paco ne povas ekzisti inter nacioj, ĝis la paco ekzistos inter najbaroj; ke, dum familioj kverelos, nacioj kverelos. Ili pretendas ke, se vi forigos malamon, timon kaj avidecon el via vivo, fine tiuj estos forigitaj el la tuta mondo!

Kiaj estas la Oxford-grupanoj? Ĉi tiuj «aŭskultantoj» apartenas al neniu speciala organizantaĵo, neniu unu religio, raso aŭ kredo. Ili estas katolikoj kaj protestantoj, judoj kaj kristanoj, nigrujoj kaj blankuloj. La Oxford-grupo ne estas organizitaĵo, kaj ĝi ne estas religio; ĝi estas nur vivmaniero. Vi ne povas aniĝi al ĝi, aŭ ekŝiĝi el ĝi: vi povas nur vivi ĝin.

Kiel vi povas aŭskulti Dion? Komencu per 15 minutoj. Sidu kviete kaj notskribu ĉiujn pensojn kiuj venas al vi. Permesu al Dio uzi vian menson. Komparu vin kun Liaj «standardoj» de absolutaj honesteco, ĉasteco, malegoismo kaj amo.

Estu tute natura kun Dio. Se vi estas dankema aŭ bedaŭrema pri io, notskribu ĝin. Se vi deziras ian specialan helpon, petu ĝin. Super ĉio, decidu ke vi obeos la gvidadon kiu venas, kia ajn estu la cirkonstanco!

Eble vi ricevos pravigon, antaŭ ol vi ricevos direkton. Eble vi devos ĝustigi okazintaĵojn, fari apologiojn, ŝanĝi interrilatojn, aŭ redoni monon.

Planu vian tagon! Nova lumigo certe venos, se vi komencos ĝin per la demando: «Kion Dio volas ke mi faru?»

Provu la pensojn kiuj venas. Uzu la

«standardojn» de la kvar absolutoj. Efektive tiujn, kiuj trapasas la provon. Komencu per tio, kion Dio petas vin fari, kaj ne supozu ke vi vidos la tutan planon unufoje. Grandaj pordoj svingiĝas sur malgrandaj ĉarniroj.

Kial vi ne aŭskultu jam morgaŭ matene? Plifruigu vian vekhorloĝon je 15 minutoj! Anigu al la milionoj da aŭskultantoj, kiuj estas dediĉantaj kvietan kvaronhoron por ĝustigi sian vivon por la tago.

Eble ĉi tiuj milionoj ja havas la solvon. Eble ili sukcesos per aŭskultado al Dio, kie homoj, aŭskultante siajn egoismajn dezirojn, malsukcesis. Ĉi tiuj homoj de MRA havas devizon:

Kiam homo aŭskultas, Dio parolas;

Kiam homo obeas, Dio agas;

Kiam homoj ŝanĝiĝas, nacioj ŝanĝiĝas.

DERRICK P. FAUX.

Interesuloj skribu al s-ro D. P. Faux (The Bungalow, New Drive, Painswick, Glos., Anglujo), kiu nun verkas libreton pri MRA.

*) Oxford (pr. Oksford) estas konata universitata urbo angla, kie la unuaj grupanoj kunvenis.

Novajoj pri la Lingva Komitato.

Laŭ ĉirkulero de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio, ing. J. R. G. Isbrucker, la Esperantista Lingva Komitato konsistas momente el 47 personoj, inkluzive de la prezidanto. El la 103 membroj antaŭmilitaj (1938), 23 mortis aŭ estas mortigitaj, 10 ne estas troveblaj (kelkaj el ili kredeble ankaŭ mortis), 15 ne respondis demandaron al ili senditan, 6 esprimis la deziron ekŝiĝi, kaj kun 2 (japanoj) kontakto ankoraŭ ne estas ebla.

10 Heroldo-abonoj por unu grupo!

Tiun bonegan rezulton atingis itala samideano Leone Constantini en Milano. Legu, kion li mem skribas pri tio:

Mi volas anonci al vi ke hodiaŭ mi sendis al s-ro Minnaja en Roma la kotizojn por 10 jarabonoj. Kiel mi povas tion fari? Post la liberigo de Milano kaj de mia persono, denove komenciĝis agado por propagando de nia lingvo Esperanto inter miaj multnombraj kolegoj-bankoficistoj. Miaj Esperantaj semoj de pasintaj jaroj, mia firma certeco de bona vojo, kaj spertoj jam faritaj skribe, buŝe kaj alimaniere kreis apud mi aŭskultemajn orelojn. Mi daŭrigis verŝi en la orelojn pri Esperanto, serĉante atingi la animojn. Mi transiras pluajn detalojn; mi estas kontenta ke la fajreroj naskitaj en ili ne malaperos. Do, mia kara kolego Lovati de la Komerca Banko gvidas nun kurson por 30 personoj; inter ili estas 26 bankoficistoj de la Banco di Roma, Milana filio. Nia Esperanto-grupo ĉe la Banco di Roma fariĝos baldaŭ sekcio de la Esperanto-Grupo de Milano, kaj viglaj esperoj subtenas nin por plimultiĝi la esperantistajn bankoficistojn en ĉiuj bankoj de Milano.

S-ro Costantini aldonas ke, laŭ lia sperto, plej fruktodona maniero por varbi bonajn fidelajn esperantistojn estas paroli en Esperanto kaj perfektigi en ĝi.

La sperto de kulturisto:

80 procentoj estas por Esperanto.

Aŭstra samideano Josef Eder skribis al ni: Mi estas 46-jara kulturisto kaj flegisto de fruktarboj, kaptisto de arvikoloj, pri kiuj mi ankaŭ instruas en kursoj tra tuta Stirio. Tiun okazon mi nature uzis ankaŭ por nia afero. Mi spertis, ke 80% de la laboristoj estas por Esperanto, 5% kontraŭ, kaj la resto indiferenta. Ke el la 80% nur dekonon lernas Esperanton, kulpas nur la inerteco. Oni ofte aŭdas: «Mi lernas, se Esperanto estos enkondukata en la lernejoj,» aŭ: «Ĝi estas io por la gejunularo.» Dum la menciitaj kursoj mi varbis 60 membrojn por la Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto, kaj la plimulto de la kursanoj subskribis la deklarojn por la petskribo al UNO.

La Estonteco de UNESCO.

De Julian Huxley, F.R.S., D.Sc.

(Fino.)

La scienco kaj la scienca pensmaniero ĝis nun estas la sola homa agadspeco, kiu estas efektive universala. Ankorau ni ekzistas ia ajn religia, estetika aŭ politika pensmaniero, kiu jam estas universala. Do ni deziras antaŭenigi ĉi tiun universalecon de la scienca pensmaniero kaj per tio helpi la konstruadon de bazo de ĝenerala universalismo.

Kiam ni malsupreniras al pli specialaj aferoj, ni observas en la perspektivo de l' evolucio, ke unu el la okazaĵoj, kiu multe efikas ĉe la lastatempa antaŭhoma evoluado de organismoj, estis pli bona kunordigo ĉe pli altaj nervaj niveloj, kunordigo de informoj kaj kunordigo de efika agado. Ni deziras transpreni tion al la socia nivelo. Rilate al tio povas UNESCO plenumi multajn valorajn funkciojn. Ĝi povas transpreni kelkajn el la funkcioj de tio, kion s-ro H.G. Wells ofte aludis per la nomo « Monda Cerbo ». Ni deziras plirapidigi la intersanĝon de ideoj. Ni deziras multe pli bonan sistemon per la intersanĝo de tio kion usonanoj nomus « varmegalaj » sciencaj informoj, — pli bonajn sistemojn de resumoj, universaligitaj, kredeble registritaj sur mikroskopaj filmoj, katalogigitaj, kaj specigitaj per unu el tiaj geniaj elpensadoj, kiujn s-ro Vanevar Bush ellaboris ĉe la Teknologa Instituto de Massachusetts. Tre grava sekcio estas kompetenta tradukistaro precipe nuntempe, kiam certaj landoj (ekzemple Rusujo, Ĉinujo kaj aliaj) ĉiam pli eistare evidentiĝas ĉe bildo de la scienca mondo. Ni deziras plifortigi sciencajn kunvenojn — de jam ekzistantaj organizoj, kiel ankaŭ de novaj —, grandajn internaciajn kunvenojn, kiel ankaŭ malgrandajn apartajn kunvenojn por diskutado pri specialaj problemoj, kiuj rilatas samtempe al pluraj fakoj. Ni deziras intersanĝon de personoj, utiligante ĉiujn plej modernajn komunikilojn, — ekzemple venigante ilin el la kolonioj al ĉi tiu lando per aviadiloj, por ke ili povu dediĉi kiel eble plej multe da tempo al renovigaj kursoj ktp. Plue ni ne forgesu la kunlaboradon kun regionaj entreprenoj, kiuj jam ekzistas, ekzemple tiuj en Okcidenta Afriko kaj en la regiono de la Kariba Maro.

Tio, kio ŝajnas precipe necesa, estas ke oni egaligu — levante, ne mallevante — la nivelojn de la scienca aktiveco en la malpli evoluigitaj regionoj de la mondo, de Ĉinujo ĝis Peruo. Oni devos fari grandegan laboron, antaŭ ol oni povos diri, ke la scienca butero estas sufiĉe dense ŝmirita sur la pano, t.e. sur la supraĵo de la tero. Nuntempe la distribuado estas trege maledala. Ĝis la tempo, kiam la sciencistoj en la malpli evoluigitaj regionoj ĉesos esti malmultaj kaj maldense disigitaj, ili estos izolaj, kaj ne ricevos sufiĉan instigon por akre interesiĝi pri la propraj problemoj. Se internaciaj organizoj ilin ne helpas, ili kredeble ne povos havigi al si la plej bonajn aparatojn por sia laboro.

Alia tasko, kiun UNESCO eble povus entrepreni, estas esplori, kioma proporcio de la nacia enspezo en ĉiu lando elspeziĝas por la scienca esplorado, pura aŭ aplikita. Tio estas necesa preparo, por ke oni difinu normojn rilate al la elspezo por sciencaj celoj. Kiam iuj registaroj rimarkas, ke aliaj multe superas ilin rilate al tiaj aferoj, ili eble komencos pli fervore interesiĝi pri siaj propraj entreprenoj samspecaj.

Generale estas evidente, ke unu el la celoj, kiujn oni devus atenti, konsiderante la aferon el la vidpunkto de la tutmonda evoluo, estas plimultigo de la scienca personaro por la pura esplorado, kiel ankaŭ por la scienca instruado ĉe universitatoj kaj lernejoj. Ni ne forgesu tre gravan kategorion: la teknikajn kaj laboratoriajn asistantojn; tiaj sciencaj laborantoj estas nepre necesaj.

Nur limigita nombro da homoj kapablas plenumi eminentan laboron ĉe la scienco, kaj iom pli granda nombro, sed ankaŭ ne plimulto, kapablas plenumi efektive utilan laboron ĉe ĝi. Ni ne forgesu, ke la neegaleco de l' homoj, rilate al la kvanto kiel ankaŭ al la kvalito, estas baza fakto de la homa naturo, kaj ke la diverseco de l' homa speco estas unu el ĝiaj ĉefaj fortecoj. Ni devus scienca eltrovi, kiel plej prudente utiligi tiun diversecon; jen nia tasko!

Eble UNESCO povus helpi iniciati Internacian Universitaton aŭ ion similan. Tre interesa estas la ideo, kiun en pluraj rondoj oni diskutis, ke estus eble starigi tian universitaton por la instruado ne nur de estontaj internaciaj ŝtaticistoj sed ankaŭ de iuj — sciencistoj, politikistoj, teknikistoj ktp. —, kiuj eble devus entrepreni laboron, kies naturo estus esence internacia.

Fine UNESCO devus laŭ la mezuro, kiel tia internacia organizo povas tion fari, forte kontraŭstari ian sugestion pri sekreteco rilate al sciencaj aferoj.

UNESCO kompreneble havos sufiĉe da laboroj kaj ne deziras entrepreni laborojn, kiujn jam prizorgas aliaj organizoj. Ĝi deziras kaj devas eltrovi, kiuj aliaj sciencaj organizoj jam ekzistas, kaj sciigi, kion ĝi povas fari por helpi al ili kunordigi siajn laborojn ktp. Ni ne forgesu ke jam ekzistas tre multaj gravaj sciencaj organizoj. Estas la diversaj internaciaj sciencaj kongresoj kaj la internaciaj sciencaj societoj, kiuj jam kunligiĝis per internacia konsilantaro, kiel ankaŭ la apartaj internaciaj organizoj por specialaj celoj, ekzemple tiuj, kiuj entreprenas esplorojn por ekstermi akridojn.

Kvankam en ĉi tiu kampo jam ekzistas multaj organizoj, troviĝas ankaŭ mankoj. Mi iomete traseris la koncernencajn librojn, kaj mi eltrovis la sufiĉe rimarkindan fakton, ke ŝajne ne ekzistas ia internacia organizo, kiu sin okupas pri treege gravaj temoj: la arkeologio. Estus tasko por UNESCO trarigardi la kampojn de studado kaj esplorado ĉe la scienco, kaj peni prizorgi

LETERO EL POLUJO

Varsovio troviĝas nun sub signo de juĝproceso, okazanta kontraŭ germanaj militkrimuloj. La benkon de l' akuzitoj okupis: Ludwig Fischer, gubernatoro de Varsovio kaj Varsovia distrikto; Ludwig Leist, plenrajtigito de Fischer; Jozef Meisinger, komandanto de polico kaj sekurservo (S.D.); kaj Max Daume, ĉefo de ordpolico.

La estintan gubernatoron de Varsovio kaj liajn helpantojn formale akuzas prokuroroj de la Pola Respubliko; sed pli akrajn akuzojn prezentas ruinoj de l' domoj en la detruita de ili ĉefurbo de Polujo, dezerto de l' kun la tero niveligita juda urbkvartalo, kie iam bolis la vivo, centoj da lokoj de publikaj ekzekutoj en Varsovio, kaj cindroj de milionoj da viktimoj, murditaj en Treblinka, Majdanek, Osviecim. Ĝuste diris la prokuroro, ke ĉiu Varsoviano rajtus kaj povus prezenti sin kiel akuz-atestanto.

Teruraj estas la perdoj kaj damaĝoj, kiujn suferis la germana okupinto la ĉefurbo de Polujo kaj ĝiaj bravaj loĝantoj. Jam en la komenco de l' milito estis terure bombardita Varsovio, en la koro de la lando estis bruligita incendio. Poste ne limigis sin la malamiko al la ekstermado de loĝantaro kaj kulturaj valoraj, sed li ĝisfundamente detruis milojn da domoj en la kreita de li Varsovia geto, sisteme bruligante domon post domo, straton post strato. Tio estis venĝo pro kontraŭstaro, pro ribelo kontraŭ la germana aŭtoritato.

Laŭ neplenaj ciferoj nur en Varsovio la germanoj murdis — en periodo de 1-a de oktobro 1939 ĝis oktobro 1944 — 791.700 homojn, krome en Varsovia distrikto dum la sama tempo estis murdataj 253.434 personoj, do kune pereis en Varsovia distrikto 1.045.134 homoj. Tiu ĉi nombro ne enhavas mortintojn pro kondiĉoj de l' okupado aŭ mortintojn inter la polaj laboristoj deportitaj en Germanujon. Laŭ neplenaj nombroj dum la okupado de Pollando germanoj mortigis 4.750.000 homojn, kaj 1.700.000 perdis sian vivon pro la okupado, do kune pereis 6.450.000 personoj.

Varsovio estis detruita en tri fazoj: septembro 1939, en tempo de aprilo 1943 ĝis aŭgusto 1944, kaj de aŭgusto 1944 ĝis januaro 1945. La konstruaĵo-detruoj en Varsovio prezentigas jene: tute detruitaj estas 11.400 konstruaĵoj, 3.900 taŭgas por riparo, kaj 9.000 estas parte detruitaj. Tiuj ĉi nombroj enhavas Varsovion, kuŝantan sur la maldekstra bordo de Vistulo kaj preskaŭ tute ruinigitan, kaj la dekstrabordan urbopar-

la plenigadon de la mankoj. Troviĝas multaj aliaj kampoj, ekzemple la malapero de grundo per erozio, kiel ankaŭ kelkaj problemoj de la antropologio kaj de la tropika medicino, ĉe kiuj oni ankoraŭ bezonas pluan organizadon.

Unu el la laboroj de UNESCO, mi opinias, estus *disvastigi pli ĝeneralan informadon pri la scienco por la edukado de plenaĝuloj*. Ĝi havos sian propran « sekcion pri publikaj rilatoj » (t.e. propagandan sekcion), eble ĝi eldonos sian propran gazeton. La sciencaj fakoj devus trapenetrigi siajn influojn en la aliajn sekciojn tiom, kiom ili sin okupas pri la informado, la gazetaro, la filmoj ktp. Ĝi eble helpus efektiviĝi alian projekton de s-ro H.G. Wells: la projekton pri *Tutmonda Enciklopedio*.

Persono mi esperas ke ĝi helpos antaŭenigi studojn pri la scienca metodologio; ekzemple esplori, laŭ kia mezuro la metodoj, kiujn oni ellaboris ĉe unu fako de la natura scienco, povas aplikigi ĉe alia fako aŭ ĉe la sociaj sciencoj, aŭ male, — la plej bonaj metodoj de kunlaborado, kaj kiel sciencaj studi la metodojn de la planado. Sed, laŭ mia opinio, la plej grava afero estas konsentigi la registarojn kaj ĝenerale ĉiujn aŭtoritatojn, ke oni povas sciencaj studi ĉiajn temojn, inkluzive de multaj, kiujn nuntempe oni ne pritraktas aŭ studas scienca, ekzemple demandojn pri la nombro de la loĝantaro, kiel ĝi pliiĝas aŭ malpliiĝas; la publika opinio; la lingvistiko, la tuta demando pri la plibonigo de lingvoj, la elpensado de novaj simbolaj helpiloj por la lingvo, la eblecoj de internacia lingvo, ktp.

Eble oni povus, kiel proponis en la jaro 1941 la Konferenco de la Brita Asocio por la Antaŭenigo de la Scienco, entrepreni sufiĉan eksperton de la naturaj riĉaĵoj de la tuta mondo.

Alia tasko, kiun devus entrepreni UNESCO, dum ĝi ankoraŭ estas infaneto — mi supozas ke ĝi ja estas infaneto, kaj jam ne nura embrio —, estas konsideri, kiajn kunligilojn oni devus estiĝi inter UNESCO, kiel internacia organizo, kaj la diversaj nacioj, kiuj reprezentigas ĉe ĝi.

ton nur malmulte detruitan. El la konstruaĵoj, uzitaj por elementaj, mezaj kaj profesiaj lernejoj, perdoj estas 70 %, alternejoj kaj sciencaj societoj 70 %, teatroj, muzeoj, bibliotekoj, arkivejoj, kinejoj kaj koncertsalonoj 80 %, hospitaloj kaj malsanulejoj 80 %, preĝejoj kaj historiaj konstruaĵoj 90 %. La supre menciitaj perdoj koncernas nur la konstruaĵojn mem, ne la internan aranĝon, kiu estas preskaŭ tute rabita aŭ detruita. La Varsovia industrio estis detruita je pli ol 90 %.

La detruoj okazis plejparte ne dum batalo, ili ne estis diktitaj de la neceseco senigi la kontraŭulon de rezistlokoj, sed ili estis sekvo de trankvila, laŭmetoda, organizita laboro, plenumita de l' okupanto je la civila urbo, kun la evidenta celo detruiri ne nur la ĉefurbon de Pollando, sed ankaŭ ĝian kulturan kaj historian centron. Varsovio ja estis monumento de pola historio kaj ĝia kulturo.

La proceso de Fischer kaj kamaradoj ne okupiĝas ekskluzive pri la perdoj kaj damaĝoj faritaj de germanoj en Pollando, sed ĝi preparolas ĉiufanke la agadon de germanaj civilaj kaj militistaj aŭtoritatoj dum la okupado. Kaj estas tre karakterize, ke ne estas « juĝproceso de venkintoj kontraŭ la venkitoj », sed juĝproceso, uzanta kontraŭ la akuzitoj la normalan juran procedon por trovi materian veron kaj justecon. Kaj la akuzitoj havas ĉiujn rajtojn sin defendi laŭ la punleĝaro.

La akuzitoj kondutas tiel, kiel kondutis iliaj « gvidantoj » dum la Nurnberga proceso: ili ne rekonas sian kulpon, sed transjetas ĝin sur siajn superulojn kaj kunulojn. Ili defendas sin plej cinike, tiel ekzemple Fischer deklaris, ke la fondo de Varsovia geto ne estis kontraŭa al la Haga Konvencio. La akuzitoj ne kuraĝas defendi la teruran aferon, al kiu tiel fidele ili servis.

I. DRATWER.

SOLA TRANSVIVINTO.

Super la malhela akvo de l' Pacifiko krozis Catalina-hidroplano je 2000-metra alto. Kiam la aviadilo atingis la blankegan strandon de tropika insuleto, pafiĝis nigra figuro, akre konturiganta kontraŭ la lazura aero, el ĝi malsupren, kaj momenton poste ŝvebis viro ĉe paraŝuto malrapide renkonte al la tero. La Catalina-flugboato brue daŭrigis sian vojdon kaj malaperis en la senfino. La izola paraŝutisto estis kaporalo Keen, bordmekanikisto de l' R.A.F., kiu pli poste rakontis la sekvantan strangan historion:

Nia « kesto » kun ok viroj sur ĝi estis patrolanta, kiam ni ekvidis japanan krozoŝipon. Tuj ni radiografis la pozicion de la ŝipo, por ke niaj ŝipoj, kiuj troviĝis en tiu regiono, povu ataki la japanan. Poste ni restis rondflugantaj super la malamika krozoŝipo por precize observadi ĝin kaj ne ĝin perdi el la vido.

Ŝajnis ke Keen ne plu precize sciis kio okazis poste, krom tio ke subite kvazaŭ eksplodis la infero. Li povis ankoraŭ malklare memori ke la « Catalina » neatendite estis atakita de seso da japanaj Zero-ĉasaviadiloj. Tuj poste li perdis la konscion.

Rekonsciiginte, li rakontis, mi provis kontakti kun la piloto per la mikrofono. Nenia respondo. Mi forlasis mian sidlokon kaj stumblis al la pilotejo. Mi preterpasis aliajn aerpafistojn, la markonistojn, la navigistojn... ĉiuj estis mortaj. Unu el niaj homoj estis terure difektita, supozeble li estis trafita de grenado el kanono. En la pilotejo kuŝis ambaŭ pilotoj, same mortaj. Mi estis la sola transvivinto. Sed mi ne sciis piloti aeroplanon. Felice la kesto flugis horizontale: antaŭ sia morto la piloto sukcesis funkciigi la aŭtomatan direktilon. Mi atendis, ĝis mi ekvidis teron, kaj saltis el la aviadilo. Indiĝenoj min prizorgis, kaj sekve, unu semajnon poste, mi estis retrovita. — Tuj poste kaporalo Keen reprenis sian aktivan deĵoron ĉe la R.A.F.

(El « Vliegwereld ».)

A. H. v. Loon:

Trafikproblemoj

Unu el la plej gravaj problemoj en granda urbo estas la funkciado de la tram- kaj aŭtobus-transporto. Ĉi tiu problemoj estas tre urga por urbo kiel Rotterdam, kies aspekto kaj strukturo tute aliĝis pro la bombardado. Multaj loĝantoj, kiuj antaŭe loĝis en la centro, nun estas endomigitaj en la randkvartaloj. Tiu translokiĝado kaŭzis multajn malfacilaĵojn, ĉar la trafikiloj ankoraŭ ne taŭge konformiĝis al la ŝanĝitaj cirkonstancoj, kaj krome, pro la milito, evidentiĝis grava manko de transportiloj, ĉar 20 procentoj de la iama veturilaro ŝteltransiris dum la milito al fremdaj manoj.

Tamen tia problemoj montriĝas ne nur en Rotterdam, sed ankaŭ en diversaj eksterlandaj urboj, eĉ tie, kie ne furiozis la milito, ekzemple en Stokholmo. Kiamaniere oni tie klopodis trovi solvon de la trafikproblemo, pri tio skribis al mi tramisto-esperantisto Martin Johansson el Sundbyberg, deĵoranta ĉe la Stokholma Tramentrepreno:



« Dum multaj jaroj oni diskutadis en nia urbo pri la trafikproblemo, i.a. pri subtera tramlinio. Oni jam komencis pri tiu tasko, kaj oni esperas esti preta post dek jaroj. Oni ankaŭ intencas anstataŭigi kvin tramliniojn per elektraj aŭtobusoj aŭ omnibusoj. Plue ekzistas projektoj por plimultigi la nombron de aŭtobusoj kaj tramlinioj. La tiel nomitaj antaŭurbaj linioj estas plilongigitaj, kaj du novaj linioj estas konstruitaj. Por la subtera linio oni intencas mendi 350 tramveturilojn, por la urbaj linioj 100 tramojn, 350 aŭtobusojn kaj 300 elektrajn omnibusojn; ses novaj remizoj estas projektitaj, el kiuj du jam estas pretaj. Oni provis la uzadon de kromvagono, kuplita al elektra omnibuso, kaj la provo sukcesis tiel bone, ke permeso estis petata por regula uzado de kromvagono sur la antaŭurbaj linioj. Ĉi tiu kromvagono povas enhavi 53 pasaĝerojn. La novaj trajnoj por la antaŭurbaj linioj konsistas el kvar vagonoj kaj povas transporti 480 pasaĝerojn. Jam dum la nuna jaro venos la novaj tramveturiloj por 104 pasaĝeroj, kaj ili estas urĝe necesaj, ĉar la manko de sufiĉe da tramoj estas ege sentebla. Ĉi tiuj sciigoj estas la ĉefaj rezultoj pri la planoj por la estontaj dek jaroj. Dum la militjaroj oni ne povis aĉeti ion, la materialo komencas eluziĝi kaj laŭnombro ne sufiĉas. »

Nia kolego cetera ankoraŭ komunikis al mi, ke la unua el la du novaj remizoj povas enhavi 125 tramveturilojn, 24 aŭtobusojn, negforŝovilojn kaj aliajn transportilojn, por sablo ktp. Ĉe la eniro de la remizo, la tramveturiloj estas transprenataj de remizopersonaro kaj veturigataj al revizejo — loko, kie oni purigas, ŝmiras kaj kontrolas ilin. Poste la tramoj estas veturigataj al la efektiva remizo. Elveturante, la remizopersonaro kondukas la tramveturilon el la remizo, kaj la veturigisto kaj la kondukto transprenas ĝin ĉe la elirejo. Antaŭ ol oni mendis la novajn tramveturilojn, oni provis la sistemon de sidanta kondukto en la aŭtobusoj, kaj poste oni rekonstruis 25 malnovajn tramveturilojn por tia sistemo. Ĉi tiuj veturiloj povas transporti dek pasaĝerojn pli ol antaŭ la rekonstruo.

Montriĝas per supre nomitaj komunikoj, kiel oni scipovas labori en Stokholmo. —

La klišo montras maldekstre s-ron Martin Johansson, Bergsgatan II, Sundbyberg, Sved., kaj dekstre s-ron A. H. v. Loon, Mathenesserdijk 251, Rotterdam W., Nederlando. La artikolo de s-ro v. Loon aperis nederlandlingve en « Taak en Tolk », monata revuo de la komunuma personaro de Rotterdam.

RIDO SANIGAS

TION LI LERNIS UNUE.

— Mi povas konstati ke vi eksfraŭligis, mia kara amiko. Vi neniam plu havas truojn en viaj ŝtrumpoj.

— Evidente! Tio estis la unua kion mia edzino lernis al mi: ŝtopi ŝtrumpojn.

EL « TRUE », LA REVUO DE VIROJ.

(Tradukis E.E. Yelland.)

Du soldatoj, unu « jankia », la alia brita, alproksimiĝis al la limo inter du eŭropaj landoj. Doganisto kontrolanta iliajn pasportojn diris al la brito: « Nu, vi estas regato de la Reĝo! » La « Tomio » faris rapidan saluton, respondante: « Jes, kaj por tio mi estas fiera. »

La doganisto turnis sin al la jankio: « Mi vidas, ke vi estas regato de Usono. » La usona soldato pufiĝis sian bruston kaj respondis en sia plej fanfarona maniero: « Mi — regato? Infero, ne! Parto de ĝi apartenas al mi. »

(H. Miller.)

Dum la milito en Norda Afriko, arabaj komercistoj estis tie persistaj kiel ili estis tedaj. Unu el ili, vendante orientajn tapiŝojn, estis speciale trudema kaj fine ofendis oficon kiu, perdinte sian paciencon, diris: « Ne! Mi diras al vi — ne! Forportu tiun ajon odoraĉan! »

La arabo nun estis ofendita kaj digne rektigis sin. « Sahib, » li respondis, « ne estas la tapiŝo kiu odoraĉas, — estas mi. »

(Ernest Graves.)

Nia Lingvo.

Regulo pri ks kaj kz.

S-ano M. Klein en Jerusaleman komunikis al ni la jenan regulon, trovitan de li, laŭ kiu Zamenhof aplikis la skribadon de la x-suno jen per ks kaj jen per kz :

1. kz estas uzata nur post e, antaŭ vokalo, kaj nur en la unua silabo de radikoj ;
2. En la nomitaj cirkonstancoj, kz estas ĉiam uzata, se la silabo ex estas radika, t.e. se ĝi ne signifas la Esperantan prefiks-sunon eks-.
3. En ĉiuj aliaj kazoj estas uzata ks.

Laŭ tiu regulo kz estas nur distingilo inter la Esperanta prefikso eks- kaj la komenca silabo ekz-.

S-ro Klein demandas, ĉu tiu regulo estas ĝusta, aŭ ĉu alia leganto trovis pli trafan.

La landnomoj.

Tri samideanoj : unu franco, unu italo kaj unu nederlandano, skribis al ni pri la landnomoj.

La franca samideano, s-ro A.L. en V., opinias ke -ujo sonas malbele kaj, ĉar (laŭ li) -io estas kontraŭfundamenta, proponas szi -ejo anstataŭ -ujo. La itala samideano, s-ro U.Br. en B., same opiniante malbela la sufikso -ujo, proponas -io (kiu laŭ li do ne estas kontraŭfundamenta) ; li ankaŭ proponas novan sufikson -eo, por indiki la lingvon, ekz. italeo (la itala lingvo), nederlandeo (la nederlanda lingvo), angleo (la angla lingvo) ktp.

La nederlandano, s-ro H. Th. en W., plendas pri la neregleco (t.e. pri la duforma sistemo) en la nomado de la landkaj popolnomoj kun iliaj adjektivoj. Li proponas derivi ĉiujn popolnomojn de la landnomoj, kaj neniam inverse, kaj por pluraj landoj li eĉ proponas novajn nomojn : Ĉino (lando), ĉinano ; Egipto (lando), egiptano ; Anglando, englandano ; Hispanio, hispanjano ; Francio (lando), franco ; Nipono (Japanujo), niponano ; Norvegio (Norvegiujo), norgano ; Ostrajko (Aŭstrio), ostrajkano ; Polso (Polujo), polskano ; ktp.

Tiu ĉi propono ne estas farita facilanime. S-ro Th. estis Cseh-instruisto en diversaj landoj, kaj la sperto pruvis al li ke lernantoj ĉiam kaj ĉiam denove intermiksis la du sistemojn uzatajn. (Tia intermikso okazas eĉ al multaj nekomencantoj.)

Kion respondi al la nomitaj samideanoj ?

Unue : La landnoma problemoj estis la temo de multaj artikoloj, polemikoj kaj eĉ disputoj jam antaŭ 25 jaroj. La tuta polemikado tiam ne havis praktikan rezulton. Nun oni povas konstati ke la sufikso -io pli kaj pli trovis uzadon, precipe ĉe laboristoj-esperantistoj, sed ankaŭ ĉe multaj aliaj. Se la Akademio oficiale donus sian sankcion al tiu uzado, estas verŝajne ke, post iom da tempo, -io kiel landnoma sufikso tute forprenus la malnovan -ujo. Tio certe estus avantaĝo, kvankam ĝi ne forigus la de s-ro Th. kritikitan duforman sistemon. Pri « kontraŭfundamenteco » de -io preskaŭ neniu plu parolas hodiaŭ ; efektive ĝi ne estas laŭfundamenta ; sed io, kio ne estas laŭ la fundamenta, pro tio ne jam estas kontraŭ ĝi.

Due : La propono de s-ro Th. estas revolucia. Ĝi jam tuŝas la Fundamenton, kaj ni ne kredas ke ĝi havas ŝancon esti akceptata. Tamen ni petas niajn legantojn esprimi pri ĝi sian opinionon.

Trie : Speciala sufikso por la « lingvo » ŝajnas al ni nebezona. Al kiu « la angla lingvo », « la itala lingvo » ktp. estas esprimo tro longaj, tiu simple forlasas la vorton « lingvo » : tio signifas en la angla (aŭ : tio signifas angle) ; li parolis en la franca (li parolis france) ; la letero estis skribita en la itala (la letero estis itale skribita).

-unta, -uta.

La supre nomita franco proponas novajn participojn -unta kaj -uta por montri devigon ; -uta estus samsignifa kun -enda, kiu (laŭ li) estas kontraŭfundamenta. Al tio estas « dirute » (dirende) ke la sama propono jam estis farita antaŭ multaj jaroj sed restis neakceptita, kaj ke sufikso -end- nek estas nek povas esti kontraŭfundamenta, ĝi nur estas ne-laŭfundamenta.

EKZAMENU VIN MEM !

Respondoj

al la demandoj en la pasinta numero.

37. El « La amo en la jaro dekmil », de E. Loh, dua ĉapitro.
38. Ĉu vi parolas Esperanton ?
39. Se la suno brilas, estus varme, kaj ni promenus.
Se la suno brilas, estus varme, kaj ni promenus.
Kiam la suno brilas, estus varme, kaj ni promenus.
Kiam la suno brilas, estus varme, kaj ni promenus.
Kiam la suno brilas, estus varme, kaj ni promenus.

Novaj demandoj kaj taskoj.

40. a) En kiu originala Esperanto-romano artefarita lingvo fariĝis lingvo nacia ? — b) En kiu originala Esperanto-romano homoj portas pintan ĉapelon kiu kovras la okulojn kaj preskaŭ la tutan vizagon ? — c) En kiu tradukita romano milionulo vivas tre mizere ?
41. Kiu kaj kio estis Cefeŭ ?
42. Kion signifas, aŭ signifis : IEMW, KEU, MEA, ET, KKK ?
43. Kiam okazis la Universalaj Kongresoj de Cambridge, Oxford, Den Haag (Hago), Barcelono ?
44. Klarigu (ne traduku nacilingven) la jenajn vortojn : a) sturno ; b) forteplano ; c) plugi ; d) efemera ; e) kroniko.
45. Kio mankas en la jena frazo : Johano vidis ciklonion mangantan ranon ?

Ni recenzas.

Stellan Engholm : *Vivo vokas*. 180 p., 13 x 20 cm. Vol. IV de la Lit. Klubo Stelo-Libro. Prezo broŝ. sv. kr. 6.50, ekskl. impostoj. Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

Oni povas aserti ke verkisto vivas duoblan vivon. Unue sian propran, realan. Due fantazian. Kaj la homoj, kiujn li kreas en sia fantazio, kelkfoje fariĝas al li tiom karaj, ke li ĉiam denove revenas al ili, ke li ĉiam denove prezentas ilin al ni, kvankam en pli evoluinta stadio.

Tiel ankaŭ Stellan Engholm. La samaj ĉefpersonoj, kiuj rolis jam en liaj antaŭaj romanoj, « Infanoj en Torento » I kaj II, rolas ankaŭ en la nova verko. Tiam ili estis infanoj, nun ili kreskis gejunuloj.

Ĉiutaga laboro, malgrandaj ĝojoj kaj ĉagrenoj, idealoj, amo, eĉ milito kaj politiko, — « vivo vokas ». Engholm ne pentras al ni idealfigurojn nek priskribas komplikajn okazintaĵojn ; sed liaj homoj estas simplaj, kaj li rakontas al ni, kiel ili vivas, sentas, laboras, agas, en proksimume normalaj cirkonstancoj. Kun iliaj bonaj kaj kun la malpli agrablaj flankoj. Guste tio faras ilin simpatiaj, kaj faras ankaŭ la aŭtoron simpatia al ni.

Por legantoj, kiuj ne legis la antaŭajn volumojn, Engholm en antaŭparolo mallonge prezentas al ni la rolulojn. Do, por bone kompreni ĉi tiun libron, ne estas necese ke oni legis la antaŭajn.

Cetera ankaŭ la nova libro proponas diversajn eblecojn por ankoraŭ plu spini la rakonton. Ekzemple, unu el la junuloj partoprenis la hispanan militon kiel volontulo. Kiam, je la fino de la libro, li revenas hejmen, li trovas sian fraton infektita de ... naci-socialistaj ideoj. Do, ekzistas ĝermo por konfliktoj, kiujn la aŭtoro eble intencas solvi en venonta libro.

La lingvo estas simpla kaj nekomplicka, eĉ kie la aŭtoro fariĝas filozofia — kaj tio okazas sufiĉe ofte. Do, oni povas ĉi tiun libron doni por legi eĉ al komencanto.

Ĉe verkisto kiel Engholm oni ne serĉas formojn kritikendajn sed tiajn interesajn, kaj plejparte imitindajn, ekz. : ŝlimaj serĉoj, sapita vizaĝo, boeco, konstruo (anst. konstruaĵo), ebena (ebenajo), tonĉenoj, ciklo (anst. biciklo), apude forĝitaj arbara vojeto, tramstaloj (remizoj), spekulaci (spekulacio). Mi ne povas aprobi : « Ĉi tuj iris al si » (al sia ĉambro). Mi trovis kelkajn prezerarojn kaj plurajn adjektivajn formojn, kie adverbiaj formoj ŝajnas preferindaj.

Resume : libro interesa, kvankam ne streĉa, verkita en tre bona Esperanto kaj nekomplicka stilo. Do, certe rekomendinda. M.

PAROLAS LA LEGANTO.

ĈU LA ATEISTOJ KAJ NEKREDULOJ KULPAS ?

En artikolo sub titolo simila al supra estas asertite ke la ateistoj kaj nekreduloj kulpas pro ĉiu malordo kaj malpaco sur la tero.

Mi apartenas al tiu kategorio de homoj, kiuj ne scias, kion kompreni sub la nomo Dio, kaj ĉar ĝi ne estas difinita kaj difinebla, mi ankaŭ ne povas kredi aŭ nekredi en ĝi. Sekve ankaŭ ne en ĉio, kio fluas el la agnosko de tia estaĵo. Mi ne kredas (tio ne nepre signifas neon) en tio kion la eklezioj diras koncerne supernaturajn verojn.

Aliflanke aro da eklezioj ekzistas kiuj reciproke nomas la aliajn nekreduloj. En kia grado kaj en kies okuloj mi estas konsiderinda nekredulo, mi ne scias. Fakte estas, ke mi ne kredas tion kion la religioj instruas koncerne supernaturajn informojn kaj klarigojn. La Biblii mi akceptas nur kiel certgrade utiligeblan fonton de historiaj faktoj. La cetero estas por mi nura respugulo de la antikva popolanimo. Mi opinias ke mi ne devas multe pli aldoni por alteriĝi ĉe la ĝenerala koncepto pri ateismo. Sed la ĝeniga en tio estas ke laŭ iuj, sendube bonvolaj homoj el tio sekvas, ke mi estas malhelpaĵo por la paco kaj bona mondordo.

Ĉu vere estas tiel ? Ĉu mi pli kulpas pri la milito ol tiuj atestimataj, bone konataj kreduloj, kiuj opiniis necese organizi krucmilitojn, ordonis inkviziciojn ktp. ? Ĉu mi pli kulpas ol tiu kiu trovas ke granda grupo da homoj faras la alvokon : « Neniame plu milito ! » iluzia, ĉar ili ne estas Di-kreduloj ? Ĉu estus vere, ke tiuj homoj ne povas havi moralentimon sen la timo pro iu venĝanta, punanta ĉiopova aŭtoritato ? Ĉu ne estus eble, ke iuj faru bone sen timo pro puno ? Ĉu ne estus eble, ke iuj respektu alies vivon, alies rajtojn pro natura inklino aŭ (pardonu) pro sana egoismo, pro raciaj konsideroj ?

Sed kiel la konstruantoj de la paco opinias efektiviĝi sian celon ? Ĉu per ekstermo de l' ateistoj kaj nekreduloj ? Ĉu per ilia submeto perforta ? Aŭ eble per ilia konverto ? Laŭ mia opinio ĉi-lastata metodo estus la sole celtrafa. Sed tiam ne per persvado, sed per konvinkigo fluanta el bonaj ekzemploj.

Ni ne ĝuos pacon tiel longe, kiel ni daŭrigos klasigita la individuojn en kategoriojn kun ĝenerale validantaj normoj. Kion alian faris Hitler dirante : Vi estas judo, do for al la gasĉambro !

E. LÖDÖR.

Rim. de red. — Ni ne kredas ke la celo de la artikolo « Ĉu la eklezioj kunkulpas ? » ĝuste estis akuzi ateistojn kaj nekredulojn. Ni komprenis ke la aŭtoroj jesis la demando, kiom ili mem faris en la titolo ; ke ili volis diri ke la eklezio ne sufiĉe faris por helpi eviti la militon. Efektive, se ĉiuj kristanoj vivus kaj agus laŭ la vortoj kaj agoj de Kristo, kaj se alireligianoj vivus kaj agus laŭ la instruoj de siaj plej sanktaj homoj, kaj se ankaŭ la t.n. « ateistoj » kondutis kaj vivus laŭ la etika voĉo de sia konscienco, milito tute ne povus okazi. Per la vorto « ateismo » la artikolverkintoj su-

La Esperanta gazetaro

(Daŭrigo.)

Maroko.

Casablanca, 5 Rue Savorgnan de Brazza, LA VERDA FLAMO. Atingis nin n-roj 1-10 (1945) kaj 4, 6-10 (1946). Organo de Maroka Esperanto-Asocio. Multobligita. Varia enhavo.

Meksiko.

Mexico, Jesus Amaya, Dir. Ap. 59, RENOVIGO. Ni ricevis n-rojn 75-81 (febr.-novembro). Presita. En lingvoj hispana (kun speciala ortografio) kaj Esperanto. La artikoloj ĝenerale estas interesaj, plejparte maldekstra-tendencaj.

Nederlando.

Amsterdam O., Middenweg 226, LABORISTA ESPERANTISTO. N-ro 1-7 (1947), 1-12 (1946), 1 (1947). Nuntempe la plej bone redaktita kaj presita laborista Esperanto-gazeto, kvankam grandparte nederlandlingva. Bonaj propagandartikoloj. Sed strange : la sept. numero ŝajne aperis en du diversaj eldonoj kun parte diferenca enhavo.

Amsterdam W., Postbus 8002, LA PROGRESANTO. Monata, presita, bone redaktita. N-roj 1-12 (jan.-dec. 1946). La revuo por pli perfektigita la Esperanto-scion de nederlandaj esperantistoj, precipe laboristaj.

Amsterdam Z., Stadionkade 6, NEDERLANDA ESPERANTISTO. N-roj 1-11 (jan.-dec. 1946). Monata, presita, bone redaktita konforme al sia celo : esti organo de nederlandaj esperantistoj.

Blaricum, J. G. Leereveld, Prof. v. Reeslaan 4, KLASBATALO. Multobligita. Ni ricevis unu numeron (aprilo 1946), ŝajne ne aperis alia numero.

's Gravenhage, Riouwstr. 172, BULTENO DE UNIVERSALA LIGO. Aperis 4 numeroj (1945/46). Ne plu aperis post majo. Vidu ankaŭ : LA PRAKTIKO.

's-Gravenhage, F. Weeke, v. Beverningkstraat 125, KOMUNIKILO de la Haga Esperanta Kontakta Komitato. Multobligita. N-roj 1-9 (1945/46). Ne plu aperis post julio.

's-Gravenhage, C. P. Brakké, Vlierboomstraat 666, KRISTANA GAZETO. Presita organo de Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj. Ni ricevis n-rojn 135-139.

's-Gravenhage, Riouwstr. 172, LA PRAKTIKO. La konata « gazeto kiu instruas kaj amuzas ». Presita, bone redaktita, ilustrita. N-roj 1-5, 6, 7, 8-9, 10-12.

Loon-op-Zand, N.B., Fraterhuis, VOJOVERO-VIVO. Propagandas por la katolika kredo. Ni ankoraŭ ne vidis numeron.

Roelofarendsveen, ESPERO KATOLIKA, kaj NEDERLANDA KATOLIKO. E.K. estas bone redaktita kaj tre bone presita, ilustrita revuo monata, necesa por ĉiu katolika esperantisto (ni ricevis jan.-dec.) ; N.K. estas 4-paĝa presita bulteno por nederlandaj esperantistoj katolikaj (ni ricevis n-rojn 7-11, jul.-dec.).

Westgraftdijk, N.H., T.J.O.-Centro, T.J.O. BULTENO por la nederlanda sekcio de T.J.O. Multobligita. Neregula.

Westgraftdijk, N.H., T.J.O.-Centro, LA JUNA VIVO. Monata organo por junaj esperantistoj, presita. Enhavo facila kaj taŭga precipe por geknaboj. Ni ricevis n-rojn 93-94, 96-108.

Norvegiujo.

Oslo, Box 942, ESPERANTOBLADET. Bone presita. Oni bonvolis postliveri al ni la jenajn numerojn : 4-7 (1940), 5, 9 (1941), 2-5, 7-10 (1942), diversaj multobligitaj bultenoj el 1943-1945, kaj denove presitaj 1-4 (1945) kaj 1-4, 6, 7, 10 (1946).

Novzelando.

Wellington, 6 Clifford Street, Karori, OFICIALA BULETIN. Multobligita. Ni ricevis unu numeron.

Palestino.

Jerusalem, Palestina Esperanto-Ligo, P. O.B. 320, INTERNA BULTENO. Multobligita. Ni ricevis unu numeron (julio 1946).

Polujo.

Krakow, Rynek Gl. 34, III., POLA ESPERANTISTO. Presita. N-roj 1-5 (majo-aŭgusto). Pri Esperanto-movado kaj kultura vivo en Pollando.

Warszawa-Okecie, R. Sakowicz, Asnyka 4, ESPERANTO-BULTENO DE POLLANDO. Presita. N-ro 1 (junio 1946).

Skotlando.

Edinburgh 7, 7 Albany Street, RUGA ESPERANTISTO. Multobligita. N-roj 2 kaj 3.

Sudafriko.

Johannesburg, Laborista Esperanto-Kunularo, P.O.B. 7356, LIBERA TRIBUNO. Multobligita. Antaŭe nomita « Per Unu Voĉo ». Ni ricevis n-rojn 23, 25, 27-30 ; de la nova kolekto 2-5 (nov. 1946). Interesaj artikoloj, sed parte tre tendencaj kaj atakaj.

Pretoria, 7-a aleo 318, Capital Park, AFRIKA VOĈO. Ni ricevis du numerojn multobligitajn : marto kaj aŭgusto 1946.

(Finota.)

pozeble celis nur tiujn homojn kiuj, ĉar ili ne kredas je iu supera potenco, nek havas aŭ rekonas konsciencon, des pli facile kaj des pli senskrupule cedas al la malbono.

RUSUJO KAJ ESPERANTO.

Mi forte aprobas la sugeston de D-ro Moci en Heroldo de 15.12.1946 (p. 1, « Post longa dormo »), ke oni baldaŭ publikigu « malferman leteron » al s-ro Stalin. Mi ĉiam pensis, kia estus la Esperanto-movado, se nur estus Rusujo tia esperantista lando, kia ĝi estis en la unuaj tagoj de nia afero. La movado estus triobligita, dekobligita, — centobligita ! Mi scias, ke la rusa esperantistaro ne tuj estus tiom multnombra, sed mi ja scias ke la rusoj estas tiaj personoj, al kiuj tuj plaĉus nia afero.

J. C. RAPPLEY.

Esperanta Radio-Kalendaro.

La horindikoj estas laŭ GMT (Tempo de la Meridiano de Greenwich). Mezeŭropanoj kaj nederlandanoj aldonu unu horon. Ni ne povas garanti pri la korekteco de la horindikoj ; eventuale ni petas ĝustigon.

- Ĉiutage** :
18.00-18.15 Praha 31,41 kaj 1961 m.
22.00-22.15 Praha 49,92 m.
- Dimanĉe** :
17.40-17.45 Wien 228,6 m.
- Lunde** :
21.10 Warszawa 49,06 m.
22.50-23.00 Praha 470 m.
- Marde** :
17.50-18.00 Sofia 32,9 m.
22.50-23.00 Ostrava 325 m.
- Merkrede** :
5.30-5.40 Wien 228,6 m.
- Ĵaŭde** :
17.55-18.00 Bern 48,66 m.
18.45-19.00 Hr. Kralové 280 m.
22.50-23.00 Praha 470 m.
- Vendrede** :
17.50-1800 Sofia 32,9 m.
18.15-1830 Hilversum NCRV, 301 m. nur la 14.2.47 : Rekonstruo.
20.30-20.45 Kortrijk 202 m.
22.50-23.00 Ostrava 325 m.
- Sabate** :
14.00-14.10 Kortrijk 202 m. Esp.-kurso de E. Symoens.
15.10-15.25 Hilversum VARA, 415 m. nur unufoje monate : 1.2.47 Nia paskokongreso ; 1.3.47 Esp.-ekzameno (dialogo ktp.).

Ankaŭ la Sveda Radio plurfoje dissendas en aŭ pri Esperanto.

ANONCETOJ

Adressaĝo. S-ro H. Valckenier, direktoro de muziklernejo kaj gvidanto de sinjorina ĥoreto « La Nova Mondo » en Hago, transloĝis al : Pieter Nieuwlandstr. 90, Utrecht, Nederlando.

La Internacia Katolika Informejo senpage donas informojn pri la katolika religio al ne-katolikoj. Fr. M. Monulfus, sekretario, Loonopzand, Nederlando. (20)

La Societo por Orienta Kulturo turnas sin al ĉiuj personoj interesataj pri orienta filozofio, Budhismo ktp. Aligu senkoste ! Ni eldonas cirkuleron, kiun ni prunte sendos al interesuloj. Adreso : S.O.K., c/o R. Petri, Järnvägshotellet, Krylbo, Svedujo.

Vegetara Gazeto aperos. Petu informojn de Christian Hougaard, St. Blichersvej 43, Aabyhøj, Danlando.

Komerlistoj, reprezentantoj, perantoj, maŝinbiklistoj, ciklomotor-amantoj el ĉiuj landoj, kiujn interesas komerc-importado de italaj mikromotoroj por biciklo, petu informojn de Guido Rossi, Via Andrea Doria 32, Milano, Italujo. Mi respondas nur al seriozaj petantoj.

Serve al monro de la utilo de Esperanto, estas petate sendi al la Komitato « La Kvar Deleĝitoj », A 335, Dubbeldam, Nederlando, el ĉiuj landoj ĉiajn specimenojn de reklammaterialo pri asekurado.

Atentu ! S-ro Robert Martin, Cercle Bas-Sénégal, Boite Postale 117, St. Louis (Sénégal), Franca Afriko, sciigas ke ĉiuj sendaĵoj, eĉ presaj, por havi ŝancon alveni al li, devas esti rekomenditaj.

P. Balkanyi, Budapest, petas ĉiujn, kiuj direktas ian demandon al li, pro la malbona ekonomia situacio en Hungarlando nepre aldoni respond kuponon, ĉar alie li ne povas respondi.

Kun seriozaj samideanoj en ĉiuj landoj deziras korespondi pri diversaj temoj Otakar Kotyk, poŝtresto, Brusnice u Trutnova, Ĉeĥoslovakio.

Kiu deziras korespondi kun germana verkisto kaj grafologo pri literaturo tutmonda kaj spirita demandoj ? Theo Beem, (21a) Bottrop/Westf., Im Hülsfeld 19, Brita Zono, Germanujo.

Volonte mi ricevus ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esperantajn gazetojn kaj librojn ktp. Mi ĉiam respondos kaj interŝanĝos laŭvole. Guido Rossi, Via Laura Ciceri Visconti 6, Milano, Italujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Sendu markojn, kaj vi ricevos la saman kvanton. Enzo Richeri, Canelli (Asti), Italujo.

Por miaj gekursanoj (20-50 jaraĵ) mi serĉas korespondantojn. Respondo certa. P.v.d. Velde, Roden 408, Nederlando.

Hungaraj gimnazianoj deziras korespondadon kun la tuta mondo. Skribu unue al Prof. J. Kondor, Nyregyhazi, Katolika Gimnazio, Horafi u. 16, Hungarujo.

Deziras korespondadon letere aŭ poŝtkarte pri ĉiuj temoj. Respondo certa. S-ro J. Van Mechelen, Em. Verreesstr. 18, Turnhout, Belgujo.

Tutmondaj gekorespondemuloj! Sendu leterojn, poŝtkartojn ! Nepre respondo. Esperanto Kurso, Ecole Garçons, Bd. J. Guesde, St. Denis (Seine), Francujo.

Pli ol 150 ĝelernantoj de Esperanta kurso deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Respondo garantiata. Adresu al D-ro Mario Bonino, Via Saccarelli 31, Torino, Italujo.

Sendu al mi poŝtmarkojn de via lando, kaj interŝanĝe mi tuj sendos en bele aranĝita letero la saman nombron da svedaj poŝtmarkoj ! Nur bone purigitaj kaj bonstataj poŝtmarkoj estos akceptataj. S-ro Arne Pettersson, Storgatan 8, Oskarshamn, Svedujo.

Filatelistoj en ĉiuj landoj! Sendu al mi 20 poŝtmarkojn de via lando, kaj vi ricevos 60 poŝtmarkojn de la skandinaviaj landoj rekompenca. Interŝanĝas ilustritajn poŝtkartojn ktp. S-ro Kjell B. Holmvik, Knäred, Svedujo.